

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1<sup>a</sup> : JULIO 1921

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

---

---

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARME, 30 - BARCELONA

---

---

## REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÈ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

---

---

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10<sup>a</sup> VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

**Kataluna Esperantista Federacio**

Redakcio kaj Administraĉio :  
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

## Optimismo

**A**GRABLAN sciigon ni kredas doni al la legantoj de KATALUNA ESPERANTISTO, anoncante ke jam de la nuna numero nia kara gazeto estos, kiel antaŭe, deksespaĝa. Post nur duonjaro de ĝia nova vivo, estas ĝoje konstati ke tia plibonigo estis ebla.

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO preskaŭ reatinigis sian antaŭan brilon kaj forton. La nuna nombro da federaciaĵoj estas 392, loĝantaj en 46 urboj kaj vilaĝoj tra la tuta Katalunujo. Estas aliĝintaj al la Federacio 16 vivoplenaj Grupoj, el Barcelona, Sabadell, Terrassa, Girona, Reus, Tarragona, Vendrell, Manlleu, Santa Coloma de Farnés kaj Vilanova i Geltrú.

Post kelkaj monatoj, en Girona, la sukcesego de nia IX.<sup>a</sup> Kongreso, kun la hela festo de la Floraj Ludoj, estos impona pruvo de la valoro de nia lingvo kaj de la intenseco de nia enlanda movado.

Tiaj faktoj kuraĝigu nin al persista laboro. Ĉiu varbu al Esperantismo novajn adeptojn kaj al nia organizaĵo novajn subtenantojn. Kaj ni agu ĉiam kun plena certeco ke ni venkos, per senlaca laboro, per obstina fido, per la forto de nia entuziasmo.

J. G.

## Nur ni estas pravaj!



UM la pasintaj monatoj Marto kaj Aprilo, okazis en Barcelono «Konferenco pri Transportoj» organizita de la «Ligo de Nacioj» kaj celanta trovi rimedojn al la komplikitaj problemoj pri transportoj; ĉar ĝi estis oficiala kunsido, delegitoj de ĉiuj Nacioj alvenis de la tuta tero kaj dum tagoj kaj tagoj oni diskutadis la problemojn en iliaj diversaj aspektoj. La oficialaj lingvoj de la Konferenco estis la samaj elektitaj de la «Paca Konferenco» t. e. la angla kaj franca, du lingvoj kiuj por esti bone parolataj kaj komprenataj en superaj teknikaj aferoj, bezonas la tutan vivon de individuo.

Kiu tion skribas, dediĉis grandan parton de sia studado al la kono de la cititaj idiomoj, kaj malgraŭ tio, ne kuraĝus fari teknikan paroladon esprimante sin per franca aŭ angla idiomo.

La ĉeestantoj de la Konferenco, delegitoj de diversaj registaroj kaj reprezentantoj de pli malpli 40 malsamaj nacioj, devis paroli la lingvon de 2, kaj en la lastaj kunsidoj la delegito de la hispana ŝtato proponis ke «ĉar la nacioj de hispana lingvo ĉeestantaj la Konferencon estis grandanombre (16 aŭ 18) estu akceptita ankaŭ la hispana lingvo kiel oficiala»—3 lingvoj—. La ĝentileco de la prezidanto akceptis provizore tiun decidon, ĝis definitiva alpeno de la «Ligo de Nacioj», plej supera organizaĵo, en Ĝenevo, kie la italaj reprezentantoj prezentos denove la jam unufoje prezentitan peton «ke ĉar la hispana lingvo estis akceptita, ne ekzistas motivo por rifuzi la italan»—4 lingvoj.—

Tiu rapida memorigo de faktoj, kion pravas? ke nur ni esperantistoj estas pravaj; nur akceptante *neutralan* lingvon la popoloj ne sentos la malbone sentitan vipfrapon de patriotismo. La hispanaj delegitoj prezentante sian proponon faris agon tute kontraŭan al la leĝoj de internacia kompreniĝo kaj samtempe pravigis nin..... Ĉu la hispana lingvo havas pli da meritoj ol aliaj pro tio ke ĝi estas la oficiala idiomo de 16 aŭ 18 sendependaj nacioj? Rilate la interesojn de la homaro tio ne estas ja merito: Kiom da loĝantoj estas en la mondo? mil milionoj? Do, la ĥinoj kiuj estas grandnombra popolo rajtas elekti; cetere ekzistas ja pli da vivantoj en ia ĥina provinceto ol en Costa Rica aŭ Guatemala aŭ la tuta Sud-Ameriko.

Ne; ne estas tiu la vojo sekvinda; nek la hispanoj pro la merito de multnacia parolata lingvo; nek la francoj pro la diplomatia paroliteco; nek la angloj pro la ĝeneralkono de sia lingvo; nek



ĥinoj, nek italoj, nek iu ajn, povos neniam akceptigi sian propran lingvon al aliaj popoloj. Nur neŭtrala lingvo estos akceptita; nur ni esperantistoj estas pravaj!!!

J. BREMÓN MASGRAU



## IX<sup>a</sup> Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



ĈU oficiala komuniko ricevita de la Organiza Komitato de nia IX.<sup>a</sup> Kongreso, aŭtable akceptis esti ĝia

Honora Prezidanto  
Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII.

Ni danku tiun honoron, konsiderante ke la alta prezido de la Reĝo signifas la helpon de ĉiaj aŭtoritatoj al la sukceso kaj soleco de nia festo.

Estas jam eldonitaj belegaj glumarkoj de la Kongreso kaj Floraj Ludoj, kun alegorioj pri la historia urbo Girona. Diverskoloraj serioj de tiuj markoj, arte desegnitaj kaj tre taŭgaj por propagando, estas aĉeteblaj ĉe la O. K.

Oni komencis la unuajn laborojn por la presado de esperanta gvidlibro, kun riĉaj ilustraĵoj kaj detalaj informoj pri la Kongresurbo.

Por la aranĝota Ekspozicio de ĉiuspecaj esperantaĵoj, per kies graveco oni intencas efike impresi la publikon, ĉiuj helpemaj samideanoj estas petataj sendi tuj la plej grandan kvanton da materialo. Al la helpantoj oni donacos diploman ateston pri partopreno.

Pri ĉio rilatanta la Kongreson, adresu al: S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario n-ro 7, Girona.

## Pri la morto de hundeto

(Fino)



ED paŝoj timemaj nun sonas ĉirkaŭ kuirejo. Tiun ĉi fojon estas malriĉulo trenanta sian korpon: esenca malamiko, rekta ido de tiu vaganta ĉirkaŭ la kaverno plena de ostoj kiun oni revidas subite en la memoro de la raso. Ebria pro indignado, la bojado raŭka, dentoj multobligitaj de malamo kaj furiozo, oni ekiras mordi la nerepacigeblan malamikon, kiam kuiristino, armita per sia balailo, sceptro antikva kaj sorĉa, ekprotektas la peridulon; kaj oni estas devigata reeniri en sian niĉon, kie, okulo plena de flamoj senpovaj kaj profundaj, oni grumblas terurajn sed vanajn malbenojn, samtempe pensante ke estas fino de ĉio, ke ne plu estas leĝoj kaj ke homa speco perdis komprenon pri justo kaj maljusto....

Ĉu tio estas ĉio? — Ne ankoraŭ, ĉar plej malgranda vivo kunmetiĝas el sennombraj devoj, kaj estas longa laboro organizi al si feliĉan ekzistadon ĉe limoj de du mondoj tiel malsamaj kiel mondo de bestoj kaj mondo de homoj. Kiel ni farus se ni devus servi, restante tamen en nia sfero, diaĵon ne plu imagan kaj similan al ni mem ĉar ĝi estas naskita de niaj pensoj, sed dion bone videblan, ĉiam ĉeestantan, ĉiam aktivan kaj tiel fremdan, tiel superan al nia estaĵo kiel ni estas tiaj antaŭ hundo?

Nun, revenante al PELLÉAS, ĝi scias preskaŭ kion oni devas fari kaj kiel konduki en hejmo de la mastro. Sed la mondo ne finiĝas apud la pordoj de domoj, kaj trans muroj kaj palisaro ekzistas universo kies gardon oni ne havas sur sin, kie ne plu estas hejme, kie la rilatoj estas ŝanĝitaj. Kiel konduki en la strato, en la kamparo, en la vendohalo, en la magazenoj? Sekve de malfacilaj kaj delikataj observadoj, ĝi komprenas ke oni ne devas obei la fremdulajn alvokojn, ke oni devas esti ĝentila kun indiferenteco kontraŭ nekonatuloj vin karesantaj. Necese estas ankaŭ konscie plenumi iajn devojn de mistera ĝentileco kontraŭ siaj fratoj la ceteraj hundoj, respekti la kokinojn kaj anserojn, kvazaŭ ne rimarki la kukojn de la sukerajisto kiuj lokiĝas insulteme tro proksime de la lango, atesti antaŭ la katoj, kiuj, sur pordaj sojloj, vin provokas per malbelaj grimacoj, malŝaton silentan sed rememorantan, kaj ne forgesi ke estas permesite kaj eĉ laŭdinde persekuti kaj sufoki musojn, ratojn, sovaĝajn kuniklojn kaj ĝenerale ĉiujn bestojn (oni devas ilin rekonii laŭ sekretaj signoj) ankoraŭ ne paciĝintajn kun la homo.

Ĉio ĉi tio kaj tiom da aferoj ankoraŭ!... Ĉu mirige estas ke PELLÉAS ŝajnis ofte meditema kontraŭ tiuj sennombraj problemoj, kaj ke ĝia humila kaj milda rigardo estis foje tiel profunda kaj grava, tiel peza de zorgoj kaj tiel plena de nelegeblaj demandoj?

Vel ĝi ne havis la sufiĉan tempon fini la pezan kaj longan taskon kiu la naturo postulas al instinkto leviganta por apudiĝi al pli hela regiono.... Malsano tre mistera kaj kiu ŝajnis speciale puni la solan beston sukcesintan eliĝi el sia naskiĝo-sfero, nedifinita malsano kiu detruas po centoj la inteligentajn hundetojn, metis finon al destinoj kaj feliĉa edukado de PELLÉAS. Mi vidis ĝin, dum du aŭ tri tagoj, kaj jam ŝanceligantan sub grandega pezo de morto, ĝojiĝi ankoraŭ je plej malgranda kareso.... Kaj nun tiom da penoj por iom pli da lumo, tiom da ardo por ami, da kuraĝo por kompreni, tiom da bonvola ĝojo, tiom da bonaj kortuŝantaj rigardoj turnitaj al homo por peti helpo kontraŭ maljustaj kaj neklarigeblaj suferoj, tiom da malfortaj bri-  
loj venantaj el profunda abismo de mondo kiu tute ne estas la nia, tiom da malgrandaj kutimoj preskaŭ homaj malĝoje ripozas sub larĝa sambuko kaj en malvarma tero, en angulo de ĝardeno....

La homo amas la hundon sed kiom pli li amus ĝin-se li konsiderus, ke en refleksebla amaso da leĝoj de l' naturo, estas tiu amo la ŝola escepto kiu sukcesas transiri, por proksimiĝi al ni, la murojn cetere nepenetreblajn, kiuj apartigas la specojn! Ni estas solaj, absolute solaj sur tiu hazarda planedo, kaj inter ĉiuj formoj de la vivo nin ĉirkaŭantaj, eĉ ne unu, escepte la hundon, estas aliĝinta al ni. Iuj estaĵoj nin timas, plej granda parto ignoras nin, kaj neniu nin amas. Ni havas, en mondo de plantoj, sklavojn mutajn kaj senmovajn, sed ili servas al ni kontraŭvole. Ili submetiĝas simple al niaj leĝoj kaj nia ĵugo. Ili estas senpovaj malliberuloj, viktimoj nekapablaj forkuri sed silente ribelaj, kaj tuj kiam estas ellasitaj ili rapidas nin perfidi kaj reiras al sia iama libereco sovaĝa kaj malbonfara. Se ili havus flugilojn, la rozo kaj tritiko forflugus je nia apudiro kiel forflugas la birdoj. Inter bestoj, ni kalkulas kelkajn servistojn nur subiĝintajn pro indiferenteco, pro malkuraĝeco aŭ pro malsaĝo: ĉevalo nesindona kaj maldiligenta obeanta nur al doloro; anaso pasiva kaj malgaja kiu restas apud ni nur ĉar ne scias kion fari aŭ kien iri, sed kiu tamen gardas, sub vilaĝana aspekto, sian subintencon; bovino kaj bovo, feliĉaj ĉar ili manĝas kaj obeemaj tial ke de post jarcentoj ili ne havas propran pensajon; ŝafo konfuzita kiu nur la timon havas kiel mastron; kokino fidela al la korto ĉar oni trovas tie pli da maizo kaj tritiko ol en la proksima arbaro. Mi ne parolas pri kato por kiu ni estas nur kaptajo tro granda kaj nemangebla, pri sovaĝa kato kies oblikva malŝato toleras nin nur kiel embarasantajn parazitajn en nia propra loĝejo. Ĝi, almenaŭ, malbenas nin en sia mistera koro, sed ĉiuj aliaj vivas apud ni kiel ili vivus apud rokaro aŭ apud iu ajn arbo. Ili tute ne amas nin, ne konas nin, apenaŭ nin rimarkas. Ili ignoras nian vivon, nian morton, nian foriron, nian revenon, nian malgajon, nian ĝojon, nian rideton. Ili tute ne komprenas eĉ sonon de nia propra voĉo de la momento kiam ĝi ne plu minacas, kaj kiam ili rigardas nin, tio estas kun la malkonfida timo de ĉevalo, tra kies okulo pasas ankoraŭ la

bildo de la vipo, aŭ kun la melankolia stulteco de remaĉuloj kiuj nin konsideras nur kiel momentan kaj senutilan akcidenton de l' herbejo.

De post miloj da jaroj ili estas apud ni tiel fremdaj al niaj pensoj, al nia amikeco, al niaj moroj, kvazaŭ la malplej frata el steloj nur de hieraŭ estus lasinta ilin fali sur nian globon. En la spaco sen limoj apartiganta la homon el ĉiuj ceteraj estaĵoj, ni sukcesis efektiviĝi al ili per penado kaj pacienco, nur du aŭ tri iluziajn paŝojn. Kaj se morgaŭ, ne aliĝante iliaj sentoj koncerne nin, naturo donus al ili la inteligenton kaj armilojn necesajn por nin venki, mi konfesas ke mi malfidus la koleran venĝemon de ĉevalo, la obstinan revenĝon de la anaso kaj la rabian malamon de ŝafo. Mi forkurus el kato kiel mi forkurus el tigro; kaj eĉ bona bovino, solena kaj revema, inspirus al mi nur singardan konfidon. Kaj pri kokino, la okulronda kaj rapida, kvazaŭ ĉe malkovro de limako aŭ vermo, mi estas certa ke ĝi min formanĝus senhezite.

Nu, en tiu indiferenteco kaj tiu tuta malkompreniĝo en kiuj vivas ĉio nin ĉirkaŭanta, en tiu ĉi mondo nekomunikebla kie ĉio havas sian celon hermetike fermitan en si mem, kie ĉiu destino estas limigita en si, kie inter estaĵoj ne ekzistas aliaj rilatoj ol tiuj de ekzekutistoj al viktimoj, de manĝantoj al manĝatoj, kie nenio povas eliri el sia fermita sfero, kie nur morto starigas kruelajn rilatojn de kaŭzo al efekto inter vivoj najbaraj, kie plej facila simpatio neniam faris konscian salton de unu speco al alia, sole, inter ĉio spiranta sur tiu ĉi tero, unu besto sukcesis rompi la fatalan baron, elŝteliĝi el si por alsalti al ni, tratanĉi definitive la grandegan zonon el mallumoj, el glacio kaj silento izolantan ĉiun kategorion de ekzistaĵoj en la nekomprenebla plano de naturo. Tiu besto, nia bona familia hundo, kvankam simpla kaj malmulte miriganta ŝajnas al ni hodiaŭ ĝia faro, proksimiĝante tiel videble al mondo en kiu ĝi ne naskiĝis kaj por kiu ĝi tute ne estas destinita, estas tamen plenuminta unu el plej ne oftaj kaj plej neverŝajnaj agoj troveblaj en la ĝenerala historio de la vivo. Kiam tiu ekkono de la besto pri la homo, kiam tiu eksterordinara transpaso de ombro al lumo efektiviĝis? Ĉu ni elserĉis la pudelon aŭ la leporhundon ĉe lupoj aŭ ŝakaloj aŭ ĝi propramove venis al ni? Ni pri tio scias nenion. Tiel longe kiel etendiĝas homaj analoj, ĝi estas apud ni kiel nun; sed kio estas homaj analoj antaŭ la tempo sen atestantoj? Jen oni renkontas ĝin ĉiam en niaj loĝejoj tiel malnovan, tiel perfekte alkonformiĝintan al niaj moroj, kvazaŭ ĝi estus aperinta en tiu tero kaj tiel kiel ĝi nun estas, samtempe kun ni. Ni tute ne devas akiri ĝian konfidon nek ĝian amikecon, ĝi naskiĝas nia amiko; okuloj ankoraŭ fermitaj, ĝi kredas jam al ni; de antaŭ sia naskiĝo ĝi sin donis al homo. Sed vorto *amiko* ne ĝuste pentras ĝian fervoran kulton. Ĝi amas kaj adoras nin kvazaŭ ni eltiris ĝin el la neniaĵo. Ĝi estas antaŭ ĉio nia kreaĵo plena de dankemo kaj pli sindona ol la pupilo de niaj okuloj. Ĝi estas nia sklavo intima kaj pasia,



kiun nenio malkuraĝigas, al kiu nenio malplaĉas, en kiu nenio detruas la ardantan fidon nek la amon. Ĝi estas solvinta per admirinda kaj frapanta maniero la timigan problemon kiun devus solvi la homa saĝeco se dia raso ekokupus nian globon. Ĝi lojale, honeste, nerevokeble, rekonis superecon de la homo kaj liveris sin al li korpe kaj anime, sen subintenco, sen bedaŭro, nur rezervante el sia sendependeco, el sia instinkto kaj sia karaktero, la parteton nepre necesan por daŭrigi la vivon antaŭfiksitan de naturo al ĝia speco. Kun certeco, kun senĝeneco kaj simpleco iom surprizantaj nin, juĝante nin pli bonaj kaj pli potencaj ol ĉio ekzistanta, ĝi perfidas, por nia profito, tutan bestan regnon, al kiu ĝi apartenas, kaj neas sen skrupuloj sian rason, siajn proksimulojn, sian patrinon kaj eĉ siajn idojn mem.

Certe estas ke inter ĉiuj inteligentaj kreaĵoj kiuj havas rajtojn, devojn, celon kaj destinton, hundo estas besto vere privilegiita. Ĝi okupas en tiu ĉi mondo unikan kaj enviindan situacion. Ĝi estas sola vivanta estaĵo kiu trovis kaj akceptas dion nedubeblan, tuŝeblan, neforlaseblan kaj definitivan. Ĝi scias al kio sin dediĉi kaj al kiu sin doni. Ĝi ne devas serĉi povon perfektan, superan kaj senfinan en mallumo, sinsekvaj mensogoj, hipotezoj kaj revoj. Tiu staras tie, antaŭ ĝi kaj ĝi moviĝas en ties lumo. Ĝi konas la superegajn devojn de ni nekonatajn. Ĝi havas moralon preterirantan ĉion kion ĝi malkovras en si mem, kaj kiun ĝi povas praktiki sen skrupulo kaj timo. Ĝi posedas la veron en ĝia pleneco. Ĝi havas idealon pozitivan kaj certan.

Kaj jen kiel, antaŭ kelkaj tagoj, antaŭ ĝia malsano, mi vidadis mian malgrandan PELLÉAS, sidantan apud mia labortablo, la vosto zorge faldita sub kruroj, la kapo iom klinita por pli bone min demandi, samtempe atenta kaj trankvila, kvazaŭ sanktulo en ĉeesto de Dio. Ĝi estis feliĉa per feliĉeco kiun ni eble neniam konos, ĉar tiu feliĉeco naskiĝis el rideto kaj aprobo de vivo nekompareble pli alta ol ĝia. Ĝi tie kuŝis studante, absorbante ĉiujn miajn rigardojn kaj grave respondante, kvazaŭ egalulo, por instrui al mi sendube ke almenaŭ per okulo, la organo preskaŭ nemateria kiu transformis en bonvolan inteligentecon la lumon kiun ni ĝuis, ĝi sciis bone diri al mi ĉion kion amo devas diri. Kaj ĝin vidante tiel, juna, ardanta, kaj kredanta, alportanta al mi, iel, el fundo de senlaca naturo, novaĵojn tute freŝajn el la vivo, konfida, mirigita kvazaŭ ĝi estus el sia raso la unua ĵus ekpaŝinta la teron kaj ke oni estus ankoraŭ en la virgaj tagoj de mondo, mi enviis la gajecon de ĝia certeco kaj diris al mi ke hundo kiu trovis bonan mastron estas pli feliĉa ol tiu kies destino flosas ankoraŭ ĉie en la ombro.

MAURICE MAETERLINK

El franca lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ

## La mila jaro

Estis la tempo, kiam sur la flavaj  
montflankoj neĝon la veter' delasis;  
rapidflugante, en multopoj ravaj,  
senlandaj birdoj super mar' transpasis.

Pastroj, monaĥoj, en kunec' rapidis  
urbojn, preĝante de ĉiel' absolvojn;  
ilin infanoj malaperi vidis  
de la kasteloj sub la nigrajn volbojn.

Pura disbrulis en fumnub' incenso  
tagojn post tagoj antaŭ sanktaltaroj;  
nokte abatojn maldormigis penso  
pri minacantaj diroj de psalmaroj.

Per voĉo plora sonoriloj plendis;  
oro plenigis monaĥejojn vastajn;  
kaj la malgaja servutul' atendis  
apud kameno fuma tagojn lastajn.

El sur la muro pendigej' lasita  
korvojn ne vidis en la nokt' malhela;  
kaj ĝis la urbo ĉirkaŭmuregita  
sin paŝti venis la anar' gazela.

En hejm' ŝloŝita virgulin' fidela  
jam ne forbrulis je l' alsopirado  
de la paĝio, kies voĉ' miela  
amon glosadis apud alta krado.

Dungosoldatoj la armilojn ĵetis,  
el la kasteloj malproksimiĝante;  
parazitaro sur kampar' vegetis,  
la senkulturajn fruktojn sekigante.

Tolo de sako kavalirojn vestis;  
polvo kuŝadis sur trofe' batala;  
kaj ambrozi' kaj vin' miela restis  
en fundo ventra de la kruĉ' kristala.

Urboj, vilaĝoj, kun solec' aspektis;  
iloj defalis el la homaj manoj;  
vane hebrea la bazar' efektis  
per plum', brokat', ermen' kaj filigranoj.

En la haveno—kvazaŭ kota lago—  
sulkojn ne lasis sur la akv' veseloj:  
lign-raŭpo rodas dum la tuta tago,  
ĉarpiojn faris la birdar' el velo.

Sen pan', sen ŝtipoj hejme, burĝoj, kiujn  
je malsatado lunofaz' timigis,  
por finkuiri lastan pecon, ĉiujn  
la laborilojn en kamen' bruligis.

Alvenis fine tago de teruro:  
kaj de nebuloj nigraj ĉirkaŭita  
traflugis fajroastro tra lazuro,  
lasante la Homaron timigita.

Atingis Okcidenton: ĝia brulo  
tra l' kverkaj trunkoj en la supro monta  
aspektis kvazaŭ, sub palpebr', okulo  
malbrila, por eterne fermiĝonta.

Poste, per ombroj vestkovriĝis spaco;  
brilis stelaroj meze de vaporoj;  
kaj el kastelo, farmodom', palaco,  
forkuris homoj kun singultaj ploroj.

Kun blankiĝintaj laŭ marmor' vizaĝoj,  
apud vasaloj en amas', nobeloj  
kune miksitaj restis ĉe l' vilaĝoj,  
en viv' vestitaj per kadavr-manteloj.

Patrino ĉirkaŭ filetar' etendis  
brakojn ameme en la senkonsolo;  
dolore ĝeme malsanuloj plendis;  
de l' fil' sin kroĉis kadukul' sur kolo.

Popolamasoj en marŝad' malcertaj  
fale, leviĝe, sin al temploj puŝis;  
nek ia lum' en hejmoj la dezertaj;  
kaj siblis vent' kaj pordoj frap-ektuŝis.

Jen fina hor'. Trumpetoj de la juĝo  
trifoje nun sonoros por la homoj;  
monaĥoj levas sur l' ofero-kruco  
Justulon inter nubo de aromoj.

Ripoz' ĝlacia. Kovras per manteloj  
 homoj la vidon lumon-rifuzantan;  
 kaj pulson sian, kvazaŭ du marteloj  
 ambosen frapaj, sentas fortbatantan.

La ruĝaj flamoj de l' kandeloj tremas;  
 birdaro nigra sub la templarkaĵoj  
 kun bru' sovaĝa dum flugad' sin premas  
 kontraŭ la riĉaj de bildar' vitraĵoj.

Kaj al la vivo kun esper' subita  
 el ter' leviĝas la amas' timema,  
 diskuras,—haltas,—krias terurita,  
 —silentas poste—kaj aŭskultas, trema...

Pasis la hor'. Silenton de l' mistero  
 nokta malpeze nur venteto ĝenas:  
 paco en mond' kaj en ĉiela sfero:  
 novjaro estas: ektagiĝo venas.

La spaco bluas; la stelar' fandiĝas;  
 kantojn de koko kokkantad' respondas;  
 milde nebul' en Okcident' kuniĝas;  
 jen Oriente or',—fajr',—sun' jam blondas.

Homar'! Reiru al la viv' volonte:  
 vi vidis nur fantomojn de vizio:  
 per kruco vin denove ŝarĝu honte,  
 ĉar staras malproksime Kalvario.

Malforta kverkarbet' de ĵus verdanta,  
 el polv' eligu vian trunkon ĵunan!  
 Se vi ne scias pri veter' fulmanta,  
 kial jam timi la dehakon nunan?

Se iam kontraŭ Dio vi ribelis,  
 sufiĉe vin jam punas nescieco;  
 Dio pekinton el la mond' ne pelis;  
 konservi lin, Li volas, al virteco.

Ĉar nur la amo estas dia vero,  
 pri estontec' terura ne deliru:  
 jarcentoj estas sole sur la tero  
 ŝtuparo de Jakob'. Homar': Vojirul

ANGEL GUIMERA

El kataluna lingvo tradukis  
 JOSEP GRAU CASAS



## Dua Kunveno de Iberaj Esperantistoj—Zaragoza



RE sukcese ĝi okazis de la 26.<sup>a</sup> ĝis la 29.<sup>a</sup> de Majo pasinta. Samideanoj el preskaŭ ĉiuj Iberaj Landoj ĉeestis, vere kaj harmonie kunigitaj per la frateco de nia esperanta idealo.

La 26.<sup>an</sup>, matene, efektiviĝis prepara kunsido kaj vespere alvenis la plej granda aro da ĉeestantoj. Ĝojan akcepton faris al la alvenantoj la samideanoj kiuj jam troviĝis en Zaragoza. Nokte, ĉe «Café Ambos Mundos», estis intima kaj agrabla rendezvuo.

La 27.<sup>an</sup>, vendredon, je la 10.<sup>a</sup> matene, okazis ĉe «Ateneo» la Malferma Kunsido. La Prezidanto de la Kunveno, nia estimata samideano S-ro Maynar, salutis kun granda emocio la esperantistaron, dezirante al la Kunveno plenan sukceson, kaj aludis pri bedaŭrinda grava malsano de sia filo David, malgraŭ kio li ĝis lasta momento vigle laboris por la okazanta Kunveno. Unuanima aplaŭdo kronis tiujn vortojn, elokventa esprimo de la ĝenerala deziro pri resaniĝo de nia juna kaj inteligenta amiko David Maynar.

Esprimis poste siajn salutojn kaj aliĝon: S-ro Julio Mangada, Direktoro de «Hispana Esperantisto», Komandanto kaj reprezentanto de la Milita Ministro; Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio»; Roberto Maraury, el la Komerca Ĉambro de Huesca; Sebastià Chaler, el la Grupoj «Lumon» kaj «Esperanta Junularo» de Terrassa; Pastro Casanovas, Prezidanto de «Ĝerona Espero» kiu invitas ĉiujn al la venonta Kataluna Kongreso en Girona; Benigno de Luna, el la Madrida Grupo, «Zamenhofa Federacio» kaj «Frateco» de El Pardo; Joan Campdelacreu, el «Esperantista Amikeco» kaj Urbestro de Manlleu; Artur Domènech, el «Barcelona Stelo»; Víctor O. de Allende; Vojingeniiero el la Provinca Deputacio de Biscaia; Francisco Máñez, el la Grupoj de Cheste kaj Valencia; Jaume Grau, el *Kataluna Esperantisto*; Jaume Claramunt, el la Societo «Nova Sento» de Barcelona; Patricio Llano, el la «Grupo de Baracaldo»; Jacinto Comella, el «Vika Esperantistaro»; reprezentanto de «Andaluzia Federacio» kaj Grupoj de Jerez kaj Sevilla; Karl Bartel, Sekretario de Esperanta Societo por Stirio kaj delegito de la Stiria Guberniestro, kiu dankas pro la gastigo de aŭstraj infanoj; Juan Serrano, el la Grupo de Córdoba; Vilardell, Sobré kaj Soler, el Sabadell, reprezentantoj de la Urbkonsilantaro, Komerca Ĉambro kaj

«Aplec Esperanta Grupo»; Manuel Balsells, reprezentanto de «Esperanta Orfeono» el Barcelona; Rómulo S. Rocamora, Prezidanto de «Barcelona Esperanta Societo»; Enric Oliver, Sekretario de «Academia de Jurisprudència i Legislació» el Barcelona.

La Sekretarioj, S-roj Gorgues kaj Llano, legis ankoraŭ pli da aliĝoj de diversaj urbestroj, societoj kaj samideanoj, el kiuj estas citinda tiu de S-ro Saldanha Carreira el Portugalujo. Fine parolis hispanlingve la Urbestro de Zaragoza, kiu esprimis fratan bonvenon al la esperantistoj kaj montriĝis fervora simpatianto kun nia paca idealo, kies esencon li trafe diris. Responde al Sinjoro Urbestro parolis samideanoj Maynar, Allende kaj Bartel kiuj dediĉis al li kaj al la urbo kelkajn ĝentilajn kaj dankajn vortojn. Meze de ĝenerala aplaŭdado la Urbestro forlasis la salonon.

Post kelkaj minutoj komenciĝis la unua Labora Kunsido. Laŭ propono de la Prezidanto, iris okupi ankaŭ la prezidan stradon, F-ino Araceli Artigas, el Huesca; Pastro Josep Casanovas, el Girona, Prezidanto de la Organiza Komitato de la nunjara Kataluna Kongreso, kaj S-ro Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», honore al la ĉarmaj esperantistinoj kaj al la katalunaj samideanoj, tiel grandnombre ĉeestantaj.

Estas diskutataj kelkaj proponoj, el kiuj distingiĝas tiu de S-ro José Artigas, el Huesca, celanta la nedevigan instruon de Esperanto ĉe la «Normalaj Lernejoj», «Institutoj», «Universitatoj», k. t. p. Ĉar jam ekzistas en Hispanujo du Reĝaj Ordonoj rilate tion, kvankam en nesufiĉa grado, la afero estos detale studata kaj oni klopodos realigi la celon esprimitan de S-ro Artigas. Je la 1.<sup>a</sup> posttagmeze finiĝis la unua laborkunsido.

Je la 4.<sup>a</sup>, estis malfermata ĉe «Palaco de Muzeoj» bela Esperanta Ekspozicio, tre multe vizitata de la enurbaj loĝantoj. Je la 5.<sup>a</sup>, okazis ekskurso al «Cabezo de Buena Vista» kie la Zaragoza samideanaro regalis la kunvenanojn per agrabla lunĉo. Nia kara amiko S-ro Allende, el Bilbao, anstataŭis tie la kufimajn vortojn de la nepraj tostantoj, parolante ŝerce tre sprite pri imaga deveno de kelkaj esperantaj radikoj. Post la agrablega ekskurso, paroladis S-ro Julio Mangada ĉe Ateneo pri la interesa temo «Rilatoj inter popoloj», kiun li disvolvis longe kaj bele, kun la supozebla fina konkludo. Varma aplaŭdo premiis lian disertacion.

La 28.<sup>an</sup>, matene, okazis la lasta Labora Kunsido. Dum ĝi, ĉefe, oni pritraktis la starigon de Ibera Esperanta organizaĵo. S-ro Mangada, el «Zamenhofa Federacio», retiris sian prezentitan proponon kaj anoncis novan, por kies redakto li petis kelkajn minutojn. Dum la intertempo estis legata kaj atente aŭskultata la propono de K. E. F. pri Ibera Esperanta Konfederacio. Preta la teksto de la vona propono de S-ro Mangada, oni pritraktis ĝin kaj

ĝi estis fine unuanime aprobata. Per tio, la Kunveno decidis: Unue: Organizati por la jaro 1922 en Madrid - El Pardo la Unuan Kongreson de Ibera Esperanta Konfederacio, dum kiu estos tio organizaĵo definitive starigata. Due: Ke la Organiza Komitato de la Konfederacio konsistu el la Komitato de la nuna Kunveno kaj unu reprezentanto de ĉiu Federacio aŭ izola Grupo jam nun ekzistantaj. Ĉar la propono de K. E. F. havis preskaŭ saman celon kiel tiu de S-ro Mangada, iĝas nenecesa ĝia diskutado, sed tamen, laŭ peto de nia prezidanto, la Kunveno rekomendas al la elektita Komitato la studadon de ĝiaj detalaj proponoj. Poste S-ro Rocamora legas interesan verkon pri «Esperanto kaj Pedagogio», kiu estas aplaŭde aprobata. Finiĝas la kunsido per belega kaj saĝa parolado de Vic-prezidanto S-ro Gastón, dankanta ĉies kunlaboradon.

Posttagmeze la Kunvenanoj faris solenan viziton al la Esperanta Ekspozicio kaj admiris la vidindaĵojn de la «Palaco de Muzeoj», kie ĝi estis instalata. Vespere faris paroladon S-ro Miguel Sancho Izquierdo, Profesoro ĉe la Zaragoza Universitato, pri «Esperanto kaj la Internacia Juro», kiun oni aplaŭdis multege.

La 29<sup>an</sup>, matene, okazis ĉe Ateneo la solena Ferma Kunsido. Ĉeestis ĝin la Rektoro de la Universitato, S-ro Ricardo Royo Vilanova, kiu, glosante la altajn kvalitojn de nia kara lingvo kaj idealan valoron de Esperantismo, faris longan kaj interesplenan paroladon interrompitan tre ofte per entuziasmaj aplaŭdoj. Aŭdiĝis impona ovacio kiam li parolis pri la respekto al ĉiuj lingvoj kiun la spirito de Esperanto plene posedas. Kelkaj samideanoj parolis ankaŭ, inter ili S-ro Allende, kiu tion faris per flua Esperanto kaŭzante tiamaniere fortan impreson ĉe la neesperantaj aŭtoritatuloj. Per koraj vortoj la Prezidanto S-ro Maynar deklaris finita la Kunvenon.

Posttagmeze ĉe la Grupo «Frateco» okazis lasta rendezuo kaj ĉiuj gesamideanoj sin adiaŭis reciproke, promesante rekomenci en siaj lokoj viglan propagandon kaj ĉeesti en venonta jaro la Unuan Iberan Kongreson.

Ni esperas ke ĝi estos ankoraŭ pli granda sukceso kaj ke por tio ĉiuj samideanoj oferos sian tutan helpon.



## Oficiala Parto



ONSCIANTE la gravecon de la problemo kiun nia samideano A. Domènech prezentis per sia artikolo aperinta sur la numero de Aprilo, ni kun granda atento studis la aferon laŭ ĝiaj diversaj aspektoj, ĉiuj eksterordinare atentindaj, kaj sukcesis alkonduki niajn celojn al baldaŭa efektiviĝo.

Kiom da fojoj prezentiĝis al ni ĉiuj okazo por malfermi kurson en Ateneoj aŭ kulturaj rondoj, kiujn interesas nia internacia lingvo, kaj kiom da fojoj pro manko de samideanoj kompetentaj ni ne povis liveri al Esperanto novajn adeptojn, kiuj naskiĝus el tiu kulturado ĉiam sukcesplena!

Antaŭ ĉio, nia klopodado turniĝas al la reorganizado de la jam ekzistanta profesoraro, kiu multon povas alporti al nia afero, kaj starigi el la samideanoj, kiuj sin sentas kun energio por plue teni la verdan standardon, vastan kaj taŭgan aron da instruistoj por povi daŭrigi sen timo la entreprenitan propagandon kaj eviti estonte la spertitan fakton, ke eĉ esperantistaj grupoj iafoje ne povis malfermi kursojn pro manko de ties gvidantoj.

Transirante el la grupaj kursoj en la neesperantistajn mediojn, ni volas ke la instruado plivastiĝu kaj havu la eblon libere disvolviĝadi en la rondoj, kiuj sin sentas altirataj al la grava problemo de lingvo internacia kaj kiujn ĝis nun ni nur tre supraĵe povis tenadi ĉe nia flanko pro la konstanta foresto de profesoroj, la solaj kapablantoj por fari el semado frukton veran kaj nutran por la arbo tutmonda.

Krom tio ni organizas por baldaŭa tempo superan kurseton, gvidotan de kelkaj el niaj plej spertaj samideanoj, por prepari tiujn, kiuj deziros prezentiĝi kiel kandidatoj por la profesora titolo en la ekzamenoj okazontaj ĉirkaŭ Septembro kaj pri kiuj ni detale raportos en la venonta numero.

Tiamaniere ni povos scii, kiel potenca estas nia forto rilate la preparolatan sencon, kaj kun pli da kuraĝo estonte ni sendanĝere kaj sentime klopodos enkonduki Esperanton en multajn fakojn kaj povos komenci kursojn en multaj lokoj, kiuj jam diversfoje sin



turnis al ni kun la deziro akcepti la internacilingvan instruadon.

Eksterurbaj samideanoj akcelu vian ellernadon por partopreni la ekzamenojn kaj tiuj enurbaj, kiuj sin sentas studemaj, ne manku en la kelksemajna komencota kurso.

De vi ĉiuj dependas la sukceso de niaj deziroj, kiuj samtempe estas ĉies.

S. ALBERICH JOFRÉ, SEKRETARIO

## ENLANDA MOVADO

TERRASSA.—Ĵus fondiĝis grupeto «Esperantista Junularo», infana fako de esperanta grupo «Lumon». Post kvarmonata lernado 20 geinfanoj jam korespondas kun eksterlandanoj. Komenciĝis nova kurso por fraŭlinoj.

RIPOLLET.—La 19<sup>an</sup> de Junio, la grupanoj de «Barcelona Steŝto» vizitis la esperantistojn el Ripollet, kiuj frate akceptis ilin akompanataj de la Urbestro, tre favora al nia movado. Estis vizitata la sidejo de la Grupo, kie oni mallonge propagande paroladis kaj oni sin turnis poste al la romarta paroĥa preĝejo, kies vidindaĵojn detale montris la paroĥestro, nia fervora samideano Pastro Planas. Altiris la atenton malgranda altaro al la Virgulino de l' Espero, patronino de la Katolikaj esperantistoj. Fine, oni oferis al la vizitantoj belan lunĉon sub la branĉaro, en la ĉirkaŭaĵoj de Ripollet.

GIRONA.—La 15.<sup>an</sup> de Junio ĉe Grupo «Ĝerona Espero» oni finis la kursojn brile kaj sukcesplene gviditajn de nia kara samideano Pastro Josep Casanovas. La dimanĉon 19.<sup>an</sup> oni fotografis la gelernintojn en la ŝtuparoj de la preĝejo Sant Felix kaj antaŭ la romepoka pordo de Sant Pere de Galligans. Poste parolis al la ĉeestantoj Pastro Casanovas kaj la Prezidanto de K. E. F. kiu varme gratulis la gelernantojn pro la feliĉa fino de la kurso ĉiam ĉeestita de pli ol 40 lernantoj. Oni kantis nian himnon kaj akompanis la grupan standardon ĝis la societa sidejo kie denove parolis ambaŭ cititaj samideanoj rekomendante persistemon en la Esperanta laborado. Posttagmeze kunsidis la Komitato de la Kongreso kun la Prezidanto de K. E. F. por pritrakti kelkajn gravajn aferojn pri la venonta Kataluna Kongreso.

## XIII<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Praha

31 Julio - 6 Aŭgusto

### Resumo de la 8.<sup>a</sup> kaj 9.<sup>a</sup> Komunikoj

**PASPORTOJ:** Por la veturo al Praha kaj reveno estas necesa pasporto, pretigita de la policestro aŭ de alia kompetenta ŝtata oficisto, vizita de la ĉeĥoslovaka ambasadorejo aŭ konsulejo kaj de la konsuloj de ĉiuj traveturotaj ŝtatoj.

En Hispanujo nur troviĝas ĝenerala konsulejo en Madrido (strato Orfila, 5).

Laŭ decido de la ĉeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj, oni ordonis ĉiujn ĉeĥoslovakajn oficejojn helpi ĉiuokaze la kongresontojn kaj ankaŭ rabati 50 % de la vizpago.


**VOJAĜRABATO:** Laŭ decido de la fervoj-ministerio oni rabatos 50 % sur la prezo de la ĉeĥoslovakaj fervojoj. Speciala fervoj-legitimacio estos sendata al la pagintoj de la kongres-kotizaĵo.

**ALIĜINTOJ:** Ĝis lastaj sciigoj de la ĝenerala sekretario de la XIII.<sup>a</sup> la nombro da aliĝintoj ĝis la 8.<sup>a</sup> de Junio estas 1700, el Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio.


**ADRESO:** Por nur prikongresaj korespondaĵoj kaj aliĝoj: S-ro Aug. Pitlik, Nerudova 40, Praha III. (Ĉeĥoslovakujo).

La Prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio, S-ro Joan Gili Norta, sin pretigas ĉeesti la internaciajn esperantajn kunvenojn: DRESDEN-PRAHA-BUDAPEST, kie li reprezentos nian katalunan organizaĵon kaj konsekvence la katalunan esperantistaron.

Por «Kataluna Esperantisto» li promesis verki specialajn raportojn pritraktantajn tiujn Kongresojn.



Pro troa materialo, ni estis devigataj prokrasti por la venonta numero la interesajn fakojn «Eksterlanda movado» kaj «Bibliografio».



# ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto  
Le Monde Espérantiste  
Esperanto-Praktiko  
Itala Esperantisto  
La Marto  
La Semisto  
Germana Esperantisto  
Hispana Esperantisto  
Internacia Komerca Revuo  
Esperantista Laboristo  
Kristana Espero  
Verda Utopio  
Vegetarano  
Espero Katolika  
La Esperantisto  
La Laborista Esperantisto

Esperanto  
Hungara Esperantisto  
Esperanto Triumfonta  
Nova Tempo  
Literaturo  
Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)  
The British Esperantist  
Nederlanda Esperanto  
La Verda Ombro  
Amerika Esperantisto  
Liberio  
L'Esperanto  
La Revuo Orienta  
El Esperanto  
Lingvo Internacia

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

---

## ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Miquel Miralles, Les Fonts de Terrassa, Terrassa - (Hispanujo), deziras interŝanĝi il. p. k. kaj esp. gazetojn.

S-ro Arno Scholze, Haydnstrasse, 10, Dresden—A 16, (Germanujo), deziras interŝanĝi p. m. Respondos tuj.

---

## AVÍS D'ADMINISTRACIÓ

Preguem als senyors delegats se serveixin remetre l'import de les quotes cobrades. Als nostres federats de llocs on no tenim encara delegat, els agraïrem ens remetin la quota directament.

# IX<sup>a</sup> Kongreso de la

## Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921

Propagandu nian Kongreson per la glumarkoj eldonitaj en 10 koloroj.

Folio kun 20 malsamaj markoj kostas 0'40 ptojn.

VIN TURNU AL:

S - RO FRANCISCO HIL

PARQUE DIVISIONARIO N.º 7 - GIRONA

---

### ESPERANTO TRIUMFONTA

---

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

### Internacia

### Komerca

### Revuo



Monata ilustrita revuo por la tutmonda komerco. Esperanto en la praktika vivo!

Mendu specimenan numeron kontraŭ duobla poŝtkarto (kun pagita respondo)! Jara abono Fr. sv. 7. -

«Internacia Komerca Revuo»,  
Zürich (Svisujo) Centra Poŝtfako, 6104.